

## La 6an-7an de oktobro 2015

### Vizito al la marborda regiono de Fukuŝima

La 6an kaj la 7an de oktobro mi vizitis la marbordan regionon de Fukuŝima kun 20 kelkaj eksaj instruistoj, membroj de la Societo de eksaj instruistoj de la gubernio Gunma. Ili ĉiuj estis lojalaj sindikatanoj, kiuj batalis kaj batalas por paco kaj homaj rajtoj, do ni ĉiuj tre amike vojaĝis. La celo estas subteni suferantojn de Fukuŝima, kiuj suferas kvaroble multe pro la tertremo, la cunamo, la nuklea akcidento kaj la misfamo pro la nomo de poluita Fukuŝima.


### La stacio Tacuta



Je la 8a horo ni ekiris de la urbo Maebaŝi de la gubernio Gunma, kaj unue ni atingis la stacion Tacuta en la urbo Naraha. Ĝi estas

provizore la plej norda stacio de la Ĵooban-linio, kiu ligus Tokion kaj Sendai, se ne estus okazintaj la cunamo kaj la nuklea akcidento. Pli norde restas reloj, sed ne kuras trajno.

# Ĵooban-linio laŭ la marbordo de Fukuŝima



En la stacidomo unu homo oficis, kaj antaŭ ĝi estis unu taksio, sed neniu vendejo funkciis. En la stacidomo estis dozmetro, kiu montris 0,161 mikrosivertojn kaj ekstere estis alia dozmetro, kiu montris 0,209. Laŭ la leĝo oni devas purigi lokon pli poluitan ol 0,23 mikrosivertojn. Eble ĉirkaŭe estas pli forte poluitaj lokoj.

Tiu ĉi stacidomo situas en la urbo Naraha, al kiu la loĝantoj nun rajtas reveni, ĉar oni jam finis purigi la urbon la 5an de septembro 2015, sed nur 450 homoj el 8000 loĝantoj revenis. Jam pasis pli ol 4 jaroj post la akcidento, kaj multaj homoj jam komencis vivi en aliaj lokoj. Gepatroj ne volas, ke iliaj infanoj vivu en radioaktiva loko. Infanoj, kiuj devis translernejiĝi multfoje pro la rifuĝado, ne plu volas tion.

En la interesaj paĝoj de la urbo la urbestro skribis jene:

Jam pasis unu monato, post kiam ni rajtis loĝi en nia urbo, kaj mi sentas, kvazaŭ la haltinta horloĝo ekfunkcius. En la urbo jam 150 familioj revenis. Tie kaj ĉi tie okazas riparadoj de domoj. Por la sekureco ni instalas 24 gvatkameraojn laŭ la ĉefaj stratoj en la urbo por ke la loĝantoj povu vivi trankvile kaj sekure.

En ĉiuj damaĝitaj urboj en Fukuŝima aperis multaj ŝtelistoj. Krome nun laboras multaj viroj el ekster Fukuŝima, do precipe virinoj timas loĝi en tia loko. Antaŭ la stacidomo estas bela bildo pri la estonteco de la urbo, sed kiam ĝi efektiviĝos?

## La stacidomo Tomioka

Tiu ĉi stacio estis relative granda stacio, kie venis rapidaj trajnoj, tamen nun restas nur kajoj, ĉar la stacidomo estis detruita de la cunamo.

Nenio ŝanĝiĝis la pejzaĝo antaŭ la stacidomo. En iu domo sidas malgranda ŝarĝaŭtomobilo portita de la cunamaj ondoj, kaj laŭ la stratoj restas detruitaj vendejoj kaj domoj. Pro forta radioaktiveco oni ne povis malkonstrui tiujn domojn. Aŭ ĉu iuj ankoraŭ havas volon



reveni ĉi tien, riparante siajn domojn?



Inter la maro kaj la kajoj nun staras granda blanka konstruaĵo, ĉirkaŭata de nigraj plastaj sakoj enhavantaj poluitan teron. En tiu instalaĵo oni malmultkvantigas la poluitaĵojn per

bruligado aŭ/kaj senakvigado. Poste oni konservas ĝin en la konservejo.

De la marborodo ni povis vidi la nuklean centralon n-ro 2 de Fukuŝima. En ĝi estas 4 reaktoroj. Kiam venis la cunamo, ankaŭ tiuj 4 reaktoroj estis en kriza situacio, perdinte du el la 3 elektrofontoj, sed la restinta unu savis Japanion. Se la tri elektrofontoj estus perdintaj, nun ne ekzistus Japanio.



En la nuklea centralo n-ro 1 troviĝas 4 detruitaj reaktoroj kaj 2 postvivintaj, kiujn ĉiujn TEPCO decidis forĵeti, sed ĝi ne promesas forĵeton de tiuj 4 reaktoroj en la centralo n-ro 2, kvankam la gubernio Fukuŝima kaj ĉiuj urboj kaj vilaĝoj en Fukuŝima forte postulas tion. Certe ĝi (kaj la registaro) intencas reuzi tiujn reaktorojn. Ili atendas, ĝis la popolanoj forgesos la akcidenton.

Mi konfesas, ke mi unuan fojon vidis nuklean centralon en Japanio. En Francio mi jam vidis reaktorojn kelkajn fojojn, ĉar multaj reaktoroj staras laŭ riveroj, sed en Japanio ĉiuj nukleaj centraloj staras apud maro, ĉar oni uzas marakvon por malvarmigi uzitan akvon. Tiu situo

estas tre danĝera por defendo de la lando. Se malamikoj volas detrui reaktorojn, tio estas tre facila. Se ili minacos nin per atako al nukleaj reaktoroj, ni havos neniun elekton krom kapitulacoon. Japanio ne povas militi. Ni devas ĉiamaniere eviti militon sub nia paca konstitucio.

## **La urbo Namie**

En la urbo Namie, ni unue vizitis la elementan lernejon Ukedo. Ukedo estis bela fiŝista urbeto kun 1800 loĝantoj, sed pro la cunamo ĉio perdiĝis. 150 homoj mortis, sed feliĉe neniun lernanton mortis, fuĝinte al la monteto 2 kilometrojn fora.





En la lernejo la konstruaĵoj restas. La supra foto estas tiu de la gimnastikejo. En la podio pendas ŝildo “Gratulon! Kursfina Ceremonio”. Eble la 11an de marto 2011 okazis aŭ la 12an estis okazonta la kursfina ceremonio.

Poste ni vizitis la stacidomon Namie. Ankaŭ ĉi tie nenio ŝanĝiĝis. Antaŭ la stacidomo staras du etaj busoj por la loĝantoj. En la ĵurnalvendejo restis faskoj da ĵurnaloj eldonitaj la 11an kaj la 12an de marto 2011, kiuj estis neniam distribuataj al la abonantoj. Apudaj vendejoj kliniĝis pro la tertremo. Staris fantome vendejoj kaj domoj, sed nenie vidiĝis homoj.



Dozmetro montris 0,585 mikrosivertojn kaj sur plastasako enhavanta poluitan teron la cifero estis 0,61. Duoble, trioble pli forta radioaktiveco ol la normo. En tia loko homoj ne povas loĝi. Kiel granda estas kolero de la eksaj loĝantoj!

## Forĵetitaj loĝantoj de Namie

Loĝantoj de Namie estis kvazaŭ forĵetitaj de la registaro dum la Katastrofo. Kiam la situacio de la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima fariĝis danĝera, ili fuĝis al la monteta distrikto Cuŝima en la sama urbo kaj restis tie 3 tagojn, kredante, ke tie ili estas sekuraj. Tamen poste klariĝis, ke la distrikto estis plej forte radioaktive en tiu regiono. La registaro sciis la fakton laŭ la informo de *Speedi*, sistemo, kiu povas antaŭvidi disvastiĝon de radioaktiveco, tamen ĝi kaŝis tiun informon antaŭ la respektivaj urboj, pretekstante, ke tio helpos evitigi al la loĝantoj panikiĝon. La urbestro koleris pro tio, kaj poste kiam li prelegis en diversaj lokoj, li nepre aldonis, ke la respondeculoj de TEPCO kaj la registaro iru al malliberejo.

Por la loĝantoj de Cuŝima, tiu estis la dua forĵetado fare de la registaro. Antaŭ la dua mondmilito ili translokiĝis en Manĉurion en la nordorienta Ĉinio laŭ la rekomendo de la registaro, sed fine de la milito ili estis forlasitaj antaŭ rusaj soldatoj sen helpoj de la registaro, nek de la armeo. Multaj mortis dum la rifuĝado, kaj postvivintaj 380 familioj el Fukuŝima enmigris en tiun distrikton Cuŝima. Post longa laborado en sovaĝaj montetoj ili sukcesis vivi trankvile, sed denove ilin atakis tragedio, kaj ankaŭ tiun ĉi fojon la registaro ne nur ne helpis ilin, sed suferigis ilin en radioaktiveco.

Tamen iuj loĝantoj de Namie estis trifoje forĵetitaj de la registaro. Iuj el Manĉurio enmigris en la sovaĝan kampon Sanrizuka de la gubernio Ĉiba. Kiam ilia vivo



ekstabiligis en la 1960-aj jaroj, la registaro decidis uzi la distrikton por la nova internacia flughaveno Narita. La loĝantoj forte kontraŭbatalis, sed vane. Ili ĉiuj estis forpelitaj de sia kara domo. Unu el tiuj forĵetitaj familioj estas tiu de s-ro Joŝizaŭa, kiu nun vartas radioaktivajn bovinojn en la urbo Nami kontraŭ la ordono de la registaro, ke tiuj bovinoj estu mortigitaj.

### **Autoŝoseo kaj radioaktiveco**

Ni veturis laŭ la aŭtoŝoseo Ĵooban-doo. La vojo inter la urboj Naraha kaj Namie estas inkludita en la neloĝebla distrikto, tio estas, ke tie estas forte radioaktive. Tamen la registaro malfermis la vojon, ĉar la Ĵooban-doo estas grava por ekonomio kaj rekonstruado de Fukuŝima. En iu haltejo estis jenaj klarigoj:

Supozata elmetiĝo de radioaktiveco al ŝoforoj estas 0,37 mikrosivertoj dum unu trapaso. Tiu cifero estas 160-ono de X-radioj dum sanekzameno.

Radioaktiveco algluita al ŝarĝoaŭtomobilo kaj al ĝia ŝarĝo dum la trapaso de tiu distrikto estis tiel malmulta, ke ni ne povis mezuri.


Se okazos akcidento kaj oni devos resti longe en tiu distrikto, kio okazos? Certe tiuj, kiuj akcidentos, estas kulpaj. Ili respondecu pri si mem. Sed pri policanoj kaj flegistoj de ambulanco? Ili laboru, ĉar ili estas salajrataj por tio. Laboristoj en la centralo povas elmetiĝi al 50 milisivertoj jare. 0,37 signifas, ke se homo restas tie dum

unu horo, tiu elmetiĝas tiom da radioaktiveco, do tio tute ne gravas por sano.


Ni transportas poluitan teron al la konservejo. Tio estas nepre necesa por la rekonstruado de Fukuŝima.

1. Ni portas poluitan teron en la plastaj sakoj, kaj kovras la tuton per tuko.
2. Ni edukas ŝoforojn kaj laboristojn pri graveco de tiu laboro kaj maniero trakti poluitan teron.
3. Ni purigos ŝarĝaŭtomobilojn, kiam ni ekveturas de la konservejo.
4. Ni parkas la ŝarĝaŭtomobilon en la izolita loko en la haltejoj.

1. Perfekte kovrata!



4. Parkejo estas izolita!



Fine de la vojaĝo ni vizitis la budhisman templon Ŝiramizu-Amida-doo kaj preĝis por la viktimoj de la Katastrofo kaj por rapida restarigo de la suferantoj.

,